# INTERNACIA ESPERANTA PARADIZO



## MEGGEN APUD LUCERNO

482 m sur maro

Stacio de l'Lago de IV Kantonoj — Fervojo Gotharda

Favorprezoj por Restado
Kafejo sur Teraso
Banoj en Lago — Banoj varmaj

Vasta Parko ombroza — Laŭnteniso
Kuirejo kaj kelo bonegaj
Boatoj — Veturiloj — Fiŝkapto

J. AMREIN, posedanto.

Typ. C. J. Bucher, Luzern

La bone konata **Pension Gottlieben**, de nun **Internacia Esperanta Paradizo**, lokita inter la belega Rigi kaj la malhela Pilatus, pro sia nekomparebla situacio, la vastega, ombroza parko kun diversaj ludejoj, la promenejoj ĉe la lago kaj la ĉarmaj ekskursioj en la ĉirkaŭaĵo, prezentas sin al la vizitantoj kiel plej agrabla kaj vere ideala restejo.

La hotelo ne estas luksa sed tute komforta. Krom la beleta manĝejo por la gastoj ekzistas salono por sinjorinoj, lego- kaj fumĉambro, vasta kafejo kun kovrita teraso, keglara ludo kaj diversaj malgrandaj ludoj. **Restado dum printempo aŭ aŭtuno precipe estas konsilinda.**

Kuracisto: S^ro^ Dr. J. Fries.

De Lucerno oni atingas Meggen en 1 horo piede, en 40 minutoj veturile, en 30 minutoj vaporŝipe kaj en 16 minutoj per fervojo (Gotharda).

| Prezoj: de l'1ª de Julio—15ª de Sept. | | por la alia tempo. | |
|---|---|---|---|
| Matenmanĝo . . . . | 0,50 Sm | . . . . . . | 0,40 Sm |
| Tagmanĝo . . . . . . | 1,20 » | . . . . . . | 1,00 » |
| Vespermanĝo . . . . | 1,00 » | . . . . . . | 0,80 » |
| Loĝado . . . . | 0,80—1,20 » | . . . | 0,80—1,00 » |
| Restado de almenaŭ 5 tagoj. . . . . | 2,20—3,20 » | . . . | 2,00—2,80 » |

Lumizo 0,56 Sm po semajno kaj ĉambro.

En la Restada prezo estas entenataj: Matenmanĝo: kafo, teo, aŭ ĉokolado kompleta; tagmanĝo: supo, 2 viandoj, multa legomo, sukeraĵo (jaŭde kaj dimanĉe 3 viandoj); vespermanĝo: supo, 2 viandoj, legomoj, kompoto kaj fromaĝo.

Familiaj aranĝoj laŭvole; por infanoj ĝis dekjaraj 20 %—25 % da rabato. Servistaro de 1,80 Sm, ĉio entenata.

Jos. AMREIN, posedanto.